

Norvega Esperantisto

N-ro 1
1994

3a periodo 57a (67a) jaro



ESPERANTOBLADET

ĝ ĉ ŝ ĵ ĥ ŭ

Kun danko al *Eventoj pro la literaro!*

El la enhavo:

Nova UNESKO-rezolucio	4
La strategi-procezo de NEL	7
Estonio (Jaan Ojalo)	9
Aranĝoj en eksterlando	9
Varbado en Vadsø	11
Recenzo: 5000 jaroj de Ĉinio	15
Internacia koresponda kurso	16

Norvega Esperantisto*

Esperantobladet

DUMONATA REVUO DE
NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Ĉi tiun numeron

redaktis Douglas Draper
Helpis Odin Roll-Hansen
Presis Rødtvet eldresenter

Peranto por Svedio: SEF,
ĉe Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455, S-242 94 Hörby

Jarabono (1994) : 70 kr.

ISSN 0029-361X

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO*

Postgirono 0803 5 100 300

UEA-konto norv-e

Ĉefdelegito de UEA :

Kjell Gustavsen,

Rasmus Engers vei 10, 0956 OSLO

Postgirono 0808 5133293

Bankgirono 1609.08.5500.3

ELDONEJO ESPERANTO*

Postgirono 0809 5100318

UEA-konto espv-s

*Komuna adreso:

Olaf Schous vei 18

N-0572 OSLO

Telefono: 22 35 08 94

Fakso samnumere (kiam iu ĉeestas).

E-poŝto : u_draper_d@kari.uio.no

(legata marde kaj vendrede ptm)

TURISMA SERVO DE NEL

ĉe Agnar Fitjar
5240 Valestrandsfossen

Telefono 56 39 42 71

Postgirono 0809 5100326

Karaj legantoj!

FINFINE! Ni havas komputilan aparaton kiu kapablas skribi la Esperantajn literojn! Kaj pliajn programojn, kiuj ebligas enpaĝigon surekranan, ni atendas, esperante, ke ni havos ilin por numero 2.

Pri la ĉi-numera malfruiĝo ni havas pli konkretan senkulpigon ol en antaŭaj kazoj: Via redaktoro klopodadas senigi je ĝena inflamo de tendeno en la dekstra brako, kiu malfaciligas skribadon - ĉu perkomputilan, ĉu permanan. Sed kiam pasis kaj januaro kaj februaro, iĝis klare ke plua prokrasto ne eblas.

Ni devas nur esperi ke tiu ĉi tamena laboro ne tute vanigos multekostan ultrasonan traktadon - kaj malebligos estontan redaktadon!

DD

N.E. legata internacie

DELONGE ni konscias, ke Norvega Esperantisto estas vigle legata en eksterlando, sed neatendita estis mencio en *Eventoj* (n-ro 46) ke ni troviĝas inter la gazetoj kiujn *Eventoj* plej ofte citis en la jaro 1993: Ni okupas, kune kun *Esperanto* (de UEA), la trian lokon per 7 citoj!

Konfesinde temis plejparte pri malfeliĉaĵoj kiaj la ŝteloj de niaj komputiloj kaj la konfuzo pri uzo de "Nordio" kaj "Nordeno". Sed: LASTMINUTA ALDONO: la nova numero de *Eventoj* (49) represas frontpaĝe la tutan ĉefartikolon el N.E. 6/93!

Ankaŭ Pola Radio en pluraj siaj mardaj programoj ("Nia Gazetaro") januare priparolis N.E. kaj legis el ĝi.

Denove ni konstatas ke nia modesta informilo estas ero en granda internacia reto.

Ni rompu la cirklojn!

"KION SIGNIFAS la verda stelo kiun vi portas sur via jako"? mi iutage norveglingve aŭdis de homo sur la strato en Hamar. Post mia entuziasmoplena klarigado pri Esperanto kiel packreanta lingvo, pri la interna ideo, pri la espero ke iam la homoj, pere de tio ke ĉiuj akceptos nian ideon, tutcerte vivos kune en plena harmonio - venis nova demando al mi: "Kiom da membroj havas tiu via sekto"?

Vidu karaj gesamideanoj! Tiel oni rigardas nin kiuj uzas Esperanton, kaj ni mem kulpas ke nia vere bona ideo ne pli bone gajnas terenon en nia mondo kiu absolute bezonas komunan lingvon flanke de la multegaj naciaj lingvoj. Ni estas tro ŝarĝitaj de heredita idealismo! Ni devas rompi niajn cirklojn de idealismo kaj vivi moderne. Kiel fari tion? Kiel agadi? Jen mia propono: Vi serĉu kontakton kun la oficialuloj en via komunumo al kiuj vi montru la utilecon de Esperanto kiel turisma lingvo. Vi kunhelpu per via tradukado de turismaj prospektoj kaj videotekstoj al la neŭtrala lingvo. Post kiam tiuj viaj laboraĵoj estos pretaj, vi faru vian eblon informi kiel eble plej

vaste tra la mondo pri via propra komunumo, pri ĝiaj vidindaĵoj ktp. Kiam venos la petleteroj pri detalinformoj, estos via tasko asisti la oficiulojn respondi. Se la rezultoj estos bonaj, vi tutcerte poste povos atendi ekonomian helpon en formo de asignoj al kulturorganizoj, kaj de la koncerna komunumo kaj de la lokaj bankoj.

Mi tutcerte ne divenas malĝuste kiam mi aludas ke via klubo ne povas vivi sen mono, kaj monon oni ricevas nur post kiam oni liveris produkton. Estas nun absolute necese rompi la cirklojn de antikva idealismo por vivi simile al aliuloj en la nuna moderna pulsanta mondo. Se ni ne faros tion, mi timas ke nia vere nobla afero formortos kun nia generacio.

Per Johan Krogstie

Formannen oppfordrer medlemmene til å komme ut av vår idealistiske innadvendthet og få esperanto tatt i bruk, f.eks. ved å gå til kommunen og få laget turistinformasjon på esperanto. Og får vi først vist språket i praktisk bruk, vil vi ha mye lettere for å få offentlig støtte.

Mencio en radio aŭ gazetoj

SE VI AŬDAS mencion pri Esperanto en **radio** aŭ **televido**, bonvolu sendi precizajn detalojn: dato, tempo, daŭro, enhavo, programuloj - al la komisiito pri radio, Elna Matland, Fløenbakken 41 D, 5009 Bergen. Antaŭdankon!

Mencion de Esperanto en norvegaj **gazetoj** bv. raporti al la Gazetara Servo de NEL, ĉe Torstein Kvakland, Inge Krokanns v. 8, 7024 Trondheim.

Husk å rapportere radioprogrammer og avisartikler hvor esperanto nevnes, til de respektive ombudene!

Nova UNESKO-rezolucio

Por la tria fojo la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion favore al Esperanto. La du antaŭaj rezolucioj datiĝas de 1954 kaj 1985. La iniciato venis ĉi-foje de la itala Esperanto-Radikala Asocio, la "Esperanta branĉo" de la transnacia sed ital-devena Radikala Partio.

Rezolucio de Unesko

La Ĝenerala Konferenco,

Memorigante la Rekomendon pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco de 1974 kaj la Rekomendojn de la Internacia Kongreso pri Paco en la Menso de la Homoj (Yamoussoukro, Eburaj Bordo, 1989),

Konsiderante la fundamentan rolon kiun lingva komunikado alirebla por ĉiuj povas ludi en la antaŭenigo de paco kaj de interpopola kompreniĝo,

Memorigante la rezolucion IV.1.4.422-4224, per kiu la Ĝenerala Konferenco de 1954 en Montevideo rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo" kaj rekonis "ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko",

Memorigante la rezolucion 11.11, per kiu la dudek-tria sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko petis la Ĝeneralan Direktoron plu sekvi "kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la

komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj" kaj invitis la Ŝtatojn-Membrojn "instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado",

Konsiderante krome ke, en la kadro de lastatempaj studoj pri aŭtomata tradukado, ekzamenado de la specifa rolo kiun povas ludi lingvo kiel Esperanto povas montriĝi aparte grava,

Petas la Ĝeneralan Direktoron konsideri la rezultojn atingitajn de la movado disvastiganta Esperanton:

(a) en la **Sinteza Raporto** pri ellaborado de instruprogramoj, pri trejnado de instruistoj kaj pri novigoj en la kampo de edukado por internacia kompreniĝo, paco, homaj rajtoj kaj demokratio,

(b) en la redaktota **manlibro** pri gvidaj principoj por komunikado de pacvaloroj;

Petas tiucele la Ŝtatojn-Membrojn raporti pri la agado plenumita kiel sekvo de la rezolucio 11.11 de 1985, precipe koncerne la studprogramojn pri Esperanto kaj iliajn rezultojn.

Generalkonferansen,

som *minner* om rekommandasjonen om utdanning for mellomfolkelig forståelse, samarbeid og fred vedtatt i 1974, og rekommandasjonen vedtatt på den internasjonale kongressen om fred i menneskenes sinn (Yamoussoukro, Elfenbeinskysten) i 1989,

som *tar i betraktning* den grunnleggende rolle en språklig kommunikasjon som er tilgjengelig for alle, kan spille i arbeidet for fred og mellomfolkelig forståelse,

som *minner* om resolusjon IV.1.4.422-4224, der generalkonferansen i 1954 i Montevideo merket seg "de resultatene som esperanto har oppnådd på området internasjonal intellektuell utveksling og tilnærming mellom verdens folk", og erkjente "at disse resultatene svarer til UNESCOs mål og idealer",

som *minner* om resolusjon 11.11, der den 23. sesjonen av UNESCOs generalkonferanse bad generaldirektøren fortsette å følge "med oppmerksomhet utviklingen til esperanto som et middel til å bedre forståelsen mellom ulike nasjoner og kulturer", og innbød medlemsstatene til "å anspore til innføring av et studieprogram om

språkproblemet og esperanto i sine skoler og institusjoner for høyere utdanning",

som dessuten *tar i betraktning* at innenfor rammen av studier i den senere tid av automatisk oversettelse kan en undersøkelse av den spesifikke rolle som et språk som esperanto kan spille her, vise seg å være særlig viktig,

anmoder generaldirektøren om å overveie de resultater som bevegelsen for å utbre esperanto har oppnådd:

a) i *synteserapporten* om utarbeiding av undervisningsprogrammer, om lærerutdanning og om fornyelse av opplæringen for mellomfolkelig forståelse, fred, menneskerettigheter og demokrati,

b) i den *håndboken* som skal utarbeides om ledende prinsipper for overføring av fredens verdier,

anmoder derfor medlemsstatene om å rapportere om de tiltak de har gjennomført som følge av resolusjon 11.11 fra 1985, særlig når det gjelder studieprogrammene om esperanto og resultatene av dem.

En norvegaj gazetoj pri la nova UNESKO-rezolucio

Nia gazetara servo en Trondheim formulis la jenan gazetaran informon kaj sendis ĝin al kelkaj norvegaj gazetoj, kaj al la gazetagentejo Norsk Telegrambyrå (NTB). Rezulte ĝi aperis en 2 tutlandaj gazetoj: Nationen** kaj Klassekampen, kaj en 6 gazetoj regionaj: Agderposten, Bergens Tidende, Hamar Arbeiderblad, Rogalands Avis**, Tønsbergs Blad kaj Østlandsposten* (Larvik).

* malongigite ** parte

Ses semajnojn pli poste Ny Tid (tutlanda semajna gazeto) aperigis ampleksan noticon, en kie ili demandis al la ministerio pri edukado

nenion faras pri la afero, kaj intervjuetis nian ĉefdelegiton Kjell Gustavsen (vd. p. 6).

Cetere nia membro Åge Melå en Horten lerte profitis la aperon de la informo pri la resolucio en Tønsbergs Blad, sendante al tiu loka gazeto sufiĉe longan "leteron de leganto" kun ĝeneralaj informoj pri Esperanto kaj la movado.

Pressemeldingen om den nye Unesco-resolusjonen ble tatt inn i 8 norske aviser - i noen tilfeller i forkortet form. Flere uker senere kom også oppslaget i Ny Tid (neste side).

Esperanto i skolen?

UNESCO- FN's organisasjon for undervisning, vitenskap og kultur, vil innføre esperanto i skolen, men dette er helt ukjent for Kirke- og undervisningsdepartementet. Rett før jul 1993 vedtok UNESCO for tredje gang en resolusjon som oppfordret medlemslandene til å innføre esperanto både i skolen og ved høyere utdanningsinstitusjoner.

Innholdsløs tilbakemelding

UNESCO ber om en tilbakemelding på hva de enkelte landene har gjort for å få esperanto inn i skolen. Det må bli en svært tynn tilbakemelding fra Norge. Ingen i departementet (KUF) vet noe om UNESCO-resolusjonene. De har visstnok aldri hørt om dem. Egil Eiende ved eksamenssekreteriatet sier at det ikke gjøres noen for å få esperanto i skolen, men stiller seg positiv til forslaget. — Det er opp til hvert enkelt medlemsland å ta stilling til de resolusjoner som blir vedtatt. Det er kun en oppfordring. Selv om UNESCO kun kommer med oppfordringer, er det kanskje på tide at KUF setter seg inn i saken?

Esperanto som valgfag

Norsk Esperanto Forbund jobber for å få inn esperanto som valgfag i skolen, men det er vanskelig fordi de må garantere lærere, og det må være nok interesse blant elevene. Forbundet har nådd ut til ca. 12000 som har lært språket bare her i Norge.

— Esperanto er et veldig enkelt språk å lære, sier Kjell Gustavsen i Norsk Esperanto Forbund. — Det er en enkel grammatikk som er uten unntakelser. Ordklasser og former betegnes ved faste endelser. Dessuten så er esperanto politisk og religiøst nøytralt, og er derfor bra å bruke for ulike nasjoner og kulturer. Da vil de forstå hverandre bedre. Folk slåss med hverandre for å få sitt eget språk inn i internasjonale sammenhenger, og med bruk av esperanto blir vi kvitt dette problemet, sier Gustavsen.

Av Anja Rålm

The logo for 'Nyttid' is presented in a stylized, bold font. The letters are thick and black, with a slight shadow or 3D effect. The 'y' and 'i' are particularly prominent. The logo is set against a dark, textured rectangular background.

Ny Tid nr. 8

25. februar 1994

REAGE AL nia artikolo "Estonio: ĉu subteno?" en N.E. 6/1993, ni ricevis la jenan artikoleon de la prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio, Jaan Ojalo.

Estonio: la plej grava manko

Danke mi notas la atenton de N.E. al la situacio de la movado en Estonio, samtempe ankaŭ monsubtenojn ricevintajn de niaj alilandaj amikoj! Tio helpas al ni daŭrigi eldonadon de nia modesta gazeto en la kondiĉoj, kiam la enspezoj de la popoltavolo okupinta sin pri E-o estas ege malaltaj.

Kial ni tamen preferus unuavice praktikan internacian kunlaboron? Antaŭ la gravaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝigoj en orienta kaj intera Eŭropo nia e-istaro havis vastajn kontaktojn inter si kaj en la orienta direkto. La ĉiujaraj BET'oj (Baltaj E-tendaroj) kunvenigis 400 - 600 partoprenantojn. Ili estis kvazaŭ malgrandaj universalaj kongresoj, finance kapablaj por partopreno al ĉiu e-isto de la Balta maro ĝis Pacifiko, inter ili ankaŭ grupoj de lernejoj. Okazis ankaŭ ĉiujaraj SEJT'oj (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj) kun kelkcentoj da partoprenantoj. Okazis regionaj kaj lokaj renkontiĝoj partoprenataj fare de diversnaciaj e-istoj. Aboneblis diversaj E-periodaĵoj, aĉeteblis Esperanta literaturo. Tio signifis praktikan uzadon de E-o, kvankam limigita estis interkomunikado kun la okcidenta E-movado (partopreno en UK, regionaj kaj fakaj aktivecoj).

Dum la lastaj 2-3 jaroj la situacio radikale ŝanĝiĝis: fiksiĝis limoj inter la landoj, aperis vizoj, naciaj valutoj ankoraŭ ne interŝanĝeblaj reciproke, ekonomiaj malfaciloj. Estonio kun sia unumiliona (estona) loĝantaro kaj proksimume tricent e-istoj (inter ili nur unu rusdevena) estas fortranĉita de la ĉirkaŭanta e-ista mondo. Aperis interna kaj ekstera premo de la angla lingvo proponanta almenaŭ ĝis nun prefer-

indan alternativon. Do Esperanto el aktuala tagordo forfalis.

Per internacia renkontiĝo de ĉefe nord-regionaj esperantistoj en Tallinn (2-4. VII 93), kiun aktive partoprenis la prezidanto de NEL s-ro P. J. Krogstie, ni esploris kiel trovi novajn eblojn por anstataŭigi niajn antaŭajn orient-direktajn praktikajn uzeblojn de E-o per okcidentdirektaj. Evidentiĝis, ke la sola fako por tiu kunlaboro povas esti turismo, kvankam ankaŭ en tiu fako staras intere de ni gravaj obstakloj, inter ili ĉefe diferenco de la vivniveloj. Ĉu ni provu superi la barojn?

Formannen i den estiske esperantoforeningen konstaterer vanskelige tider for bevegelsen der, men vil gjerne få i gang samarbeidstiltak innenfor turismen heller enn motta pengegaver.

Aranĝoj en eksterlando

30. marto - 5. aprilo: Internacia Junulara Festivalo, Torino, Italio.

1. - 8. aprilo (paske): Printempa Semajno Internacia, Eifel, Germanio. Precipe (sed ne nur) familia seminario

29. aprilo - 2. majo. Latvia Internacia Printempo. Ĉe la Balta Maro.

1. - 8. majo: TEJO/KER-seminario, Strasburgo.

20. - 23. majo (pentekoste): Jar-kongreso de Germana E-Asocio, kun postkongresa ŝipekskurso al Oslo!! - kie okazos ĉiĉeronado germanlingva!!!

▶ 25. - 29. majo: Esperantaj tagoj de Staszów, Pollando

13. - 18. junio: somera kurso de la popola altlernejo de Karlskoga (Vd. N.E. 4/93, p. 32)

25. junio - 2. julio. Esperanto kaj naturo, naturprotekta seminario, Voŝu, Estonio.

4. - 8. julio: Somera studsemajno en Jyväskylä, Finnlando.

23. - 30. julio: Universala Kongreso, Seulo, Koreio.

30. julio - 5. aŭgusto: Jarkonferenco de ILEI (instruista ligo) apud Seulo.

.....

Ni ricevis ankaŭ informilojn pri **konstantaj kursejoj k.s.:**

Kultura Centro E-ista (KCE), La Chaux-de-Fonds, Svislando (ampleksa katalogo kun altkvalitaj kursoj kaj seminarioj tra la tuta jaro)

Internacia E-ista Feriejo, Międzygórze, Suda Pollando.

Esperantologiaj studoj, Universitato Eötvös Lóránd, Budapest. (Vd. N.E. 3/93 p.15.)

Noor Turist, Tallinn, Estonio aranĝas moderprezajn busvojaĝojn inter Estonio kaj Skandinavio.

Pliaj detaloj pri la ĉi-supraj aranĝoj haveblaj en nia oficejo

MULTE PLI AMPLEKSAN LISTON vi trovos en la marta numero de Esperanto aŭ de Heroldo.

La Eldonejo:

Kion oni ekzakte decidis en la ĝenerala kunveno en Skjeberg lastjare?

Hva var det nøyaktig som ble vedtatt om omleggingen av Forlaget i fjor i Skjeberg?

En Norvega Esperantisto n-ro 4/93 ni raportetis, sub rubriko "Ĉefaj decidoj de la landa kunveno" (p.25) ke la propono malfondi la Eldonejon kiel akcian societon estis akceptita.

Por la bona ordo ni jen prezentas la plenan protokolan tekston:

3.1 Generalforsamlingen pålegger styret å forestå oppløsning av Esperantoforlaget A/S i henhold til de offentlige regler (Aksjeloven).

3.2 Dersom det senere fremkommer opplysninger som i vesentlig grad taler imot oppløsning av selskapet, har styret anledning til å utsette i-verksettelsen i påvente av avgjørelse ved neste generalforsamling.

Som vi skrev i Norvega Esperantisto 4/94, regner man ikke med at dette vil få nevneverdige konsekvenser for boksalgvirksomheten.

Oni do rajtigis al la estraro malfondi la Eldonejon kiel akcian societon, kondiĉe ke ne aperos novaj informoj kiuj parolos kontraŭ tio.

Sed, kiel ni skribis en Norvega Esperantisto 4/93, oni supozas, ke tiu administracia ŝanĝo ne havos sekvojn por la praktika funkciado libroserva.

La strategi-procezo

Lastnumere (p.5) ni aludis ke NEL planas seminarion pri strategio. Tiu seminario estos parto de pli ampleksa procezo inter la membroj.

Kiel gvidkomisionon por tiu procezo la estraro nomis Torstein Kvakland (Trondheim), Jon Arne Holm, Douglas Draper kaj Cato Haugen (ĉi-lastaj Oslo).

Kiel unua fazo de la procezo ni petis la klubanojn proponi kelkajn celojn por nia agado en la venonta kvin jaroj. Vidu la ĉi-suban leteron.

Ni esperas ke ankaŭ aliaj membroj, kiuj ne partoprenis kluban diskuton, volos sendi siajn proponojn.

INVITASJON TIL ALLE KLUBBENE I NORSK ESPERANTO-FORBUND

Vårt forbund er en liten organisasjon med små ressurser som vi bør utnytte så godt som mulig. For å få til det, må vi prioritere mellom mange viktige arbeidsoppgaver. For å kunne prioritere fornuftig, er det avgjørende at vi har klart for oss hva som er organisasjonens mål. I vedtektene står det at vi skal utbre og styrke esperanto, og at vi skal arbeide for å få språket anerkjent i internasjonalt samarbeid. For å kunne målrette organisasjonens arbeid, må vi definere hvilke mål vi skal prioritere nå. Disse målene må være i overensstemmelse med de overordnede målene i vedtektene.

Styret har bestemt at dette er en diskusjon organisasjonen skal begynne på nå. For at så mange av medlemmene som mulig skal kunne være med å bestemme retningen for arbeidet vårt framover, bør alle klubbene følge oppfordringen om å diskutere dette emnet.

Styret ber derfor klubbene om å:

1. diskutere hvilke mål vi bør arbeide fram mot de nærmeste fem åra.
2. sette opp liste over mål.

Resultatet av klubbenes målformuleringer vil i sin tur danne grunnlaget for et seminar hvor vi vil diskutere hvilket (eller hvilke?) mål vi skal prioritere i løpet av femårsperioden, og hvordan vi skal nå dette målet. (Seminalet er også nevnt i N.E. nr. 6 og i Forbundets rundskriv i januar.)

Ut fra diskusjonen om mål må vi også diskutere hvilken målgruppe vi skal prioritere å henvende oss til for å oppnå målet.

Eksempel på målformulering:

Norges Naturvernforbund har en kampanje gående for å unngå overproduksjon av søppel.

Mål: Få produsenter av varer til ikke å produsere unødvendig emballasje.

Målgruppe: Norske vareprodusenter, norske forbrukere.

(Middel: Oppfordre forbrukerne til å legge igjen unødvendig emballasje i butikken.)

► Hensikten med Norsk Esperanto-Forbunds måldebatt blir å få fram mange av denne typen mål. Når vi har fått dem på bordet, kan vi ta stilling til hvilket av disse målene det er fornuftig å satse på nettopp nå, med de ressursene vi har til rådighet. Men den diskusjonen får vi ta i neste omgang. Diskusjonen om hvordan vi

skal nå fram til målet lar vi også ligge i denne omgangen. Nå må vi først finne ut, og bli enige om, hva målet vårt er.

Forbundskontoret svarer på spørsmål.
Tlf. 22 35 08 94

For styringsgruppa for NELs
mål- og strategiprosess
Torstein Kvakland
Trondheim, 29.1.1994

Novajoj de la estraro.

Ĝemeliĝo kun Rŭando

En septembro venis letero de la juna Esperanto-asocio en la malgranda centrafrika lando Rŭando, petante konsilojn aŭ ideojn, kaj helpon pri libroj kaj broŝuroj. Ili ankaŭ proponas ĝemeliĝon, kaj al tio la estraro jesis.

Styret har godtatt et forslag fra Esperantoforeningen i Rwanda om å inngå vennskapsavtale.

Partopreno en UN-seminario

En seminario de la UN-asocio (FN-sambandet) pri norvega helpo al evolulandoj reprezentis nin Ivo Špira, juna membro en Nøtterøy (apud Tønsberg). Li neformale disdonis informojn pri Esperanto al la aliaj partoprenantoj.

Prunti el la biblioteko de NEL

Se membro loĝanta ekster Hamar prunteprenas libron el nia biblioteko, NEL pagas la afrankon por la a/sendo. (Sed la resendan afrankon pagu la pruntinto mem.) Tamen se la sumaj elspezoj por tia afranko atingos 300 kr. en la nuna jaro, la estraro re-konsideros la decidon. (Pri pruntoj kaj aliaj konkretaj demandoj koncerne nian bibliotekon turnu vin al Bjørn Carlsen, Joh. Hirsch' gt. 6 F, 2300 Hamar.)

Når medlemmer som ikke bor på Hamar låner bøker fra biblioteket vårt, dekker Forbundet portoene på forsendelsen fra Hamar, mens låneren må dekke returportoene.

Kiel krei lokan grupon el nenio

Ni petis nian pioniron en Vadsø*, Ole Fredrik Holm Jensen, skribi al ni pri sia varbado. Jen resume liaj vidpunktoj pri la afero:

1. **POZITIVAĴOJ:** Efektive estis facile ekinteresi homojn pri Esperanto. La plej multaj komprenas la logikon de la ideo pri komuna lingvo. Kopiante laŭeĝe, mi aranĝis senkoston lernadon laŭ la radiokurso de Rømmesmo. La loka gazeto aperigis artikolon bazitan sur mia teksto, kun ilustraĵoj. Mi igis la bibliotekon mendi "Peer Gynt" kaj libron de Astrid Lindgren. Mi petskribis al la komunumo pri mono por esperantlingva turistinformilo (sed ankoraŭ ne ricevis respondon). Mi parolas kun la homoj kiujn mi renkontas - ĵus ankaŭ en kurso pri la rusa kie mi estas lernanto, donante al ili fulminstruon pri Esperanto.

2. **NEGATIVAĴOJ:** Iuj lingvistoj, kaj aliaj kun altnivela edukado, patronaĉas Esperanton, kaj ne preterlasas okazon disdiri ke la angla estas la solvo. Konfesinde, parto de la kursanaro ŝajne trovis Esperanton tro malfacila. Aliaj, kvankam edukitaj, ofte laboras malmulte, kio donas maltro da progreso. La nivelo en la grupo variis, kaj tio fortimigis la plej malfortajn. Mia granda aktivado ankaŭ pasivigas la aliajn. Kvankam ni renkontiĝas nur unu fojon monate, pluraj forestis. Ofte mi devas fari ĉion mem. Tio estas la kazo ekz-e pri la kontakto kun Murmansk. Tro ofte homoj deklaras ke ili ne havas monon, ke ili ne povas oferi multan tempon. Alivorte ili ne sufiĉe ardas por la afero. Tiukaŭze la dudek homoj en la grupo ŝrumpis al nur kvin aŭ ses.

3. **RESUMO:** Vere la rebatoj ne estas surprizo: Estis multaj novuloj sen lingvosperto. Ni neniam aŭdis Esperanton, kaj ne havis instruiston. Mi

supozas ke la origina grupo trioniĝos, sed baldaŭ venos kelkaj novaj lernemuloj, tiel ke ni stabiligiĝos kiel pli forta studrondo kies anoj laboros pli memstare. Komuna celo devas esti leviĝi al iom inda nivelo por utiligi kaj ĝui la lingvon, ekz. per legado de revuoj.

4. **Fine KELKAJ KONSILOJ:** Ne surpriziĝu se venos rebatoj kaj iuj forestos. Ne haltigu la varbadon. Ruzu, ekz. dismetante la minikurson en atendejojn, kun lokaj informoj kaj telefona numero de kontaktulo. Montru laŭeble baldaŭ al la publiko ke Esperanto funkcias: Mi projektas akcepti ruson el Murmansk en majo, kaj provos interkomuniki kun li en Esperanto kun prelego ekz-e en la muzeo de Vadsø, kaj en intervjuo en loka gazeto "Finnmarken". Vidu homoj: Esperanto funkcias, jam interkomencantoj!

13.12.93

Elnorvegigis OR/DD

* Vadsø situas en Finnmark ĉe Varangerfjordo, nemalproksime de la rusa limo.

Ole Fredrik Jensen samlet i løpet av kort tid et tyvetalls interesserte i Vadsø, til tross for at det var ingen medlemmer der fra før.

Han forteller at det egentlig var enkelt å få folk til å si seg interessert i esperanto. Han fikk spalteplass i lokalavisen, og ordnet med kopiering av radiokurset til Jon Rømmesmo.

Men etterhvert ble det en del frafall fra studiegruppen, noe som ofte skyldtes at deltakerne ikke tok arbeidet alvorlig nok. Han mener likevel at gruppen vil stabilisere seg på 5-6 medlemmer som i større grad kan arbeide på egen hånd. Han har invitert en russer til å komme fra Murmansk i mai, og vil bruke dette besøket til å vise at språket virker utmerket, selv blant nybegynnere.

Norvega Kroniko

Oslo

15/12-93. Odd Tangerud prezentis, kiel kutime en la lasta klubkunveno antaŭ la kristnasko, literaturprogramon. Ĉar ĉi tiu kunveno okazis en la Zamenhoftago, lia programo estis dediĉata al la spirito de Zamenhof: "Haltigo de la malbonaj fortoj en la homaro."

Odd Tangerud laŭtlegis la fabelon "Mil noktoj", kaj eltiraĵojn de "Heimskringla" de Snorre. Popolkanton ĉi-bazitan Odd Tangerud estis tradukinta Esperanten, kaj li disdonis al la ĉeestantoj, kiuj kantis ĝin.

Raportis Odd Kolbrek

Kabana kurso en Asker

En la semajnfino de 15.1 ĝis 16.1 por la dua fojo okazis esperantokurso ĉe la bieno Solli en Asker (25 km sudokcidente de Oslo) gvidata de Tamiko Kaŭakami Nielsen el la Oslo-klubo. Ĉeestis entute 9 personoj.

Tiu ĉi kunveno estis vigla afero. La instruado baziĝis sur laŭtlegado de mal-longaj tekstoj. Helpe de gvidvortoj disdonitaj al la kursanoj ni aktiviĝis per demandoj/ respondoj koncerne la tekstojn. Ni ankaŭ vidis esperantlingvan filmon pri japana preventa medicino: Orienta Speciala Diina Masaĝo (Koksosto-ĝustiga Prem-kneda Terapio) kaj gimnastiko, kiun instruis s-o Masayuki Saionji, kiu ankaŭ dum la Universala Kongreso en Bergeno instruis tiun metodon en la Grieghalo.

Fine ni interŝanĝis ideojn pri plibonigo de nia ejo en Oslo, kaj pri pli bona informado pri Esperanto. Iuj opiniis ke je longa perspektivo estus plej bone trovi pli centran lokon kaj pli grandan ejon kun ebleco por vendado de manĝo/ trinkaĵo en aranĝita kafej(et)o.

Bjørn K. Øyen

! Similaj kursoj samloke okazos sabate/dimanĉe de la semajnoj 10, 17, 21 kaj 23.

Bergen

La Esperantoklubo de Bergen havis sian antaŭkristnaskan kunvenon la 10an de decembro en la hejmo de ges.roj Fanebust. Belomamita tablo kaj bongustaj manĝaĵo kaj trinkaĵo atendis nin, kaj ni ĝuis la kunestadon dum ekstere regis malvarmo.

Arne F. Rasmussen rakontis pri vojaĝo per "Hurtigruten" (rapidŝipo), kiun li travivis kune kun Elna en belega, sunbrila septembra vetero.

Agnar Fitjar prezentis amuzan boato-historieton. Kaj kiel kutime en la decembraj kunvenoj ni havis lotadon. La prezidanto Ingebjørg Rambjør pretigis salutkartojn, kiujn ni subskribis. Ilin ni sendis al "parencaj" kluboj por Kristnasko.

Raportis Elna Matland

La Esperantoklubo de Bergen jarkunvenis la 17an de januaro. La jarraporto atestis pri vigla agado, kunvenoj, ekskurso kaj festo. Membroj de la klubo partoprenis en Valencio. Krom tio, junuloj ĉeestis la "faman" Internacian Seminarion, kiun kutime aranĝas la germana Esperanto-junularo. Raporto kaj kalkulo estis ambaŭ aprobitaj.

La elektoj donis la jenan rezulton: Prez. Ingebjørg Rambjør, vicprez. Anne Karin Bondhus, sekr. Eli Fitjar, kas. Agnar Fitjar, ano Lilly Davanger. Anstataŭantoj: Elin Strandenes, Svanhild Nese kaj Trude With. Revizoro: Asbjørn Iversen, kontaktulo por la amaskomunikiloj Elna Matland, studgvidanto Elna Matland kaj raportisto por N.E. Elna Matland. Nova elekta komisiono: Solveig Fanebust kaj Elna Matland. Kluba librokomisiulo fariĝis Ingebjørg Rambjør.

Ni devas ankaŭ aldoni ke la prezidanto memorigis nin pri la tri membroj kiuj forlasis nin poreterne dum la jaro pasinta: Leonora Sivertsen, Nelly Bjørge Nilsen kaj Edvin M. Akerø. Ni ĉiuj manksentos ilin.

Raportis Elna Matland

La Norda Stelo, Hamar

Jarkunveno: La Norda Stelo jarkunvenis la 26an de Januaro kaj jen la rezulto de la elekto. Prezidanto: Egil O. Larsen. Vicprezidanto: Kjellaug Austad. Sekretario: Kåre Bye. Kasisto: Jon Martin Alnes. Estraraninoj: Ragnhild Alnes kaj Solveig Stensby. Geanstataŭantoj: Eva Rennemo kaj Sverre Opsahl. Revizoroj: Bjørn Carlsen kaj Odd Rennemo.

K.B.

Mara Vento, Haugesund

La januara Kristnaska Klubkunveno de Mara Vento okazis en "Den Norske Bank" (La Norvega Banko) la 14an de januaro -

94. Estis do "festa" kunveno, ĉar la klubaj aferoj ne estis multnombraj.

La prezidanto Kjetland malfermis la kunvenon kaj memorparolis pri Olav Thormodsen, kiu mortis Kristnaskvesperon -92.

Kanto sekvis. La festa komitato faris bonegan laboron. Ili estis: Klara Dahl, Kristian [?Kristiansen] kaj Vaček Sestak. Tabloj plenaj de manĝaĵo kaj trinkaĵoj "renkontis" nin. La tabloj estis bele ornamitaj. En angulo ni vidis la Esperantan standardon. Ĉiu klubano kunhavis "Kristnaskan donacon". Ĉi tiuj estis lotumitaj post la manĝado. Sestak prezentis tre interesan lumbildkonkurson. Rønnevig prezentis la muzikon.

Ĉeestis 24 personoj.

V. Sestak

Vær med og støtt fredsarbeid du også!

Stiftelsen Fred ble opprettet i 1986 for å skaffe penger til et fond som det frivillige fredsarbeid fritt kan disponere på egne premisser. Stiftelsen ledes av et råd og et styre, hvor bl.a. Kirke-, utdannings- og forskningsdepartementet er representert. Mange ulike fredsengasjementer har nydt godt av økonomisk støtte fra fondets avkastning. Du kan enten gi bidrag til praktisk fredsarbeid eller til fredsforskning. Bidrag til fredsforskning kan føres til fradrag i selvangivelsen. Giveren vil i januar måned få tilsendt en kvittering.

Bidrag kan sendes Stiftelsen Fred, c/o Kornhaug Norsk Fredssenter, P.b. 73, 2620 Follebu. Postgirokonto nr. 0825 0406550.

Husk å merke talongen fredsarbeid eller fredsforskning.

La norvega pacfonduso alvokas al niaj membroj donaci kontribuadojn. (Ni aperigas la alvokon ĉi tie ĉar NEL estas unu el la ĉ 17 organizoj kiuj

konsistigas la konsilion de la paco-centro Kornhaug.) Donacon oni povas direkti aŭ por praktika paclaboro aŭ por pripaca esplorado. En ĉi-lastakazo oni rajtas depreni la sumon de sia impostebla enspezo.

UTDELING AV STIPEND

Styret for Stiftelsen Fred skal i april 1994 fordele fondets avkastning til prosjekter som er rettet mot fredsskapende virksomheter. Enkeltpersoner eller organisasjoner som har planer om slike prosjekter kan søke om støtte. Det kan ikke søkes til allerede gjennomførte/ avsluttede prosjekter. Søknad sendes innen 1. mars 1994 til Stiftelsen Fred, c/o Kornhaug Norsk Fredssenter, P.b. 73, 2620 Follebu. Tlf.: 61 22 09 64.

La norvega pacfonduso invitas sendi petskribojn pri subvencio de pacokrea agado.

La diftongo *aŭ* evidentigas, ke Zamenhof ĉerpis el la germana lingvo, kie la verboj *daŭri* kaj *bedaŭri* estas *dauern* kaj *bedauern*. Ĉar tiuj du verboj, malgraŭ la granda intersimilo kaj la tre ofta ĝermana prefikso *be-*, ne estas parencaj, oni povas demandi sin, kial li ne iris rekte al la latina *durare* (= i.a. *daŭri*) aŭ la itala *durare*, la hispana *durar* aŭ la franca *durer*, kiuj signifas "daŭri". Eble *daŭri* estas pli belsona ol *duri*, eble ĝuste la samsoneco de la du verboj *dauern* kaj *bedauern* decidis. La fakto tamen restas, ke la radiko *dur* enestas en *durativo*, kiu estas la verba aspekto, kiu, ĝuste, esprimas daŭron, en Esperanto, kiel scias ĉiu, esprimata per la sufikso *-ad*.

Ni iom pli precize rigardu la du verbojn. Permesu, ke mi komencu per la pli longa, ĉar pri ĝi la komentoj estas mallongaj. La elemento *daŭr* en *bedaŭri* estas tre parenca al la adjektivo, kiu signifas "multekosta", do germane *teuer*, norvege *dyr*. Ni ja havas la verbon *bedyre*.

Transirante al la alia verbo, do al *daŭri*, ni jam konstatis, ke la latina kaj la latinidaj lingvoj ne havas *aŭ*, sed *u*. Tio gvidas nin al la demando; ĉu la verbo havas ian konekson kun la latina adjektivo *durus* (=malmola)? PIV informas, ke ankaŭ Esperanto, kiel neologismon, havas la adjektivon *dura* kun la signifo "malmola". Kaj ni ja scias, ke, en la norvega kaj aliaj lingvoj, *dur* estas la "malo" de *moll* en la muziko. *Moll*, el la latina *mollis*, estas la sama vorto kiel en Esperanto *mola*. Ĉu ni trovis la trakon al la solvo? Jes! Ĉar ĝuste la adjektivo

durus estas la baza vorto. Ĉar tiu adjektivo signifas "malmola", la verbo *durare* havas la bazajn signifojn "malmoligi" kaj "esti malmola". Tiel ĝi povis signifi ankaŭ "elteni" kaj, do, "daŭri"! Samtempe ni povas konstati, ke nia (norvega) *durabel*, pruntita vorto, latine; *durabilis*, signifas "daŭra". Ni ankaŭ havas la formon *durabelig*. Sed la preskaŭ samsignifa *drabelig* estas el alia radiko, devenante de iom malnova germana vorto kun la signifo "bonega", kaj parenco de la sveda verbo *drabba* (=trafi).

Johan Hammond Rosbach

Priplorinda fiasko

Antaŭ kelkaj monatoj eliris al ĉiuj esperantoklubo en Norvegujo ducela letero. Ĝi enhavis tripartan konkurson, kiu povus doni interesan kaj streĉan programon en klubkunveno. Ĉiu membro de la klubo povus sendi sian solvon, aldonante dekkronan poŝtmarkon neuzitan, kiu kovru afrankon de la dissenditaj leteroj plus konsiderindan premion, kaj cetere donu belan sumon por la gazeto.

La limdato de la konkurso pasis. Alvenis malmultegaj respondoj, la plej multaj sen aldono de poŝtmarko! Estas plorinda fiasko, kiu ne zorgis pri enspezo, sed, male, pri elspezo! Cetere la laboro de la kreado de la konkurso estas senvalora.

Tio ja signifas, ke ankaŭ la promesita premio signifas elspezon. Tamen libropremio estas sendita al Kåre Bye, Hamar, kiu brile solvis la taskojn.

JHR

Recenzo:

5000 jaroj de Ĉinio.

Preskaŭ 400-paĝa estas la libro de Caŭ Bajlong pri la longega historio de la granda popolo. Oni komencas per la primitiva socio kaj kondukas nin ĝis la revolucio en 1911.

Ni lernas pri la pekinaj simi-homoj kaj pri antikvaj mitoj kaj legendoj. Ni estas kondukataj tra la famaj dinastioj. Oni prezentas ekonomion kaj kulturon. Ni imponiĝas pro la brilaj atingoj kiel ekzemple la invento de papero, la konstato, ke la terglobo estas ronda, ke la luno lumas nur pro la reflektado de la sunradioj, ni komprenas, ke oni ege interesiĝis pri tertremoj, sed ja ne sciis, ke oni inventis sismografon!

La libro estas bone tradukita de Faibo, tre facile legebla de eŭropano, kio denove pravas la internaciecon de Esperanto!

Caŭ Bajlong : 5000 jaroj de Ĉinio,
Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1988.
18 gld. ĉe UEA (ev. per nia Eldonejo).

Johan Hammond Rosbach.

Elekto el 250 Esperanto-kunvenoj

Kiel kutime, la printempa duobla numero de "Heroldo de Esperanto" enhavas liston de feriaj renkontiĝoj, seminarioj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto.

La listo por 1994, en kiu aperas datoj, adresoj kaj programoj, priskribas ĉe 250 aranĝojn en la tuta mondo.

Oni povas senpage ricevi tiun duoblan numeron, petante ĝin de la redakcio (Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (To), Italia.).

- A. Fighiera-Sikorska, redaktorino.

La Sarajeva sieĝo: alia vidpunkto.

Nia abonanto en Leskovac, Serbio afable sendis al ni kiel kotizon anstataŭ dinaroj tre interesan libron "Sociaj aspektoj de la esperanto movado", eldonita de la Esperanto asocio de Bosnia kaj Hercegovina. Ni estas tre dankaj pro ricevo de tia valora ero de la Esperanto-kulturo.

Kaj sur enŝovita slipo li komentas la titolon de la nun famiĝinta libro "Raporto pri Sarajeva sieĝo" (prezentita en N.E. 5/94, p.23):

"En la titolo estas malvero. La vero estas ĉi tia: Muzulmano tenas muzulmanan Sarajevon kur ĉirkaŭaĵo, kie estas serbaj vilaĝoj. La serboj ne permesas a muzulmanoj ke ili bruligu serban teritorion, kaj tio ne estas sieĝo, [sed] defendo.

Preterpase, ankaŭ la muzulmanoj estas serboj, kiuj subpreme transiris al islamo sub la turka okupado. Poste ili ricevadis privilegiojn, kaj tio plaĉis al ili. Kaj nun al ili iuj promesas privilegiojn [por?] ke ili militu. [Sed] tio estas nur mensogaj promesoj."

Ĉi tiu gazeto ne plu atingas la iamajn legantojn en Sarajevo, pro tragikaj kaŭzoj. Sed eble aliuloj volas plukomenti la ĉi-suprajn vidpunktojn?

Nova adreso en Stokholmo.

Sveda Esperanto-Federacio translok-iĝis. La nova adreso de la Esperanto-Centro en Stokholmo estas

Vikingagatan 24,
S-113 42 Stockholm.

Tlf. +46-8-34 08 00.

Fakso +46-8-34 08 10.

Internacia Koresponda Kurso

De Hungara Esperanto-Asocio ni ricevis oferton de internacia koresponda lingvokurso por progresantoj. La lernolibro konsistas el 20 lecionoj al kiuj ligiĝas entute 40 taskfolioj sur 80 paĝoj. Ilin vi ricevos po kelkaj per poŝto kun la jam korektitaj taskfolioj. La taskfolioj sekvas la libron de Henrik Seppik: La tuta Esperanto (haveblan en nia vendobreto).

Kotizo: 150 nederlandaj gld. (=ĉ 600 kr.), por lernantoj en Norvegio (kaj simile riĉaj landoj).

Por rapidigi la intersendon de la lecionoj ni eble povas peri faksadon en la oficejo de NEL, kontraŭ kroma pago.

Lernante per kurso hungara vi garantiante evitos norvegismojn! Kaj hungaraj produktoj havas renomon pro bona lingva kvalito.

Ĉu jen ideo por plialtigi la lingvan nivelon en via loka grupo?

Pliaj detaloj pri la kurso en nia oficejo.

DD

En la vendobretaro

Zlatko Dizdarević: *Rakontoj pri Sarajeva sieĝo*. 80 p. 24 cm. 95 kr. (Vd. cetere N.E.5, p.23.)

Ordbok svenska-esperanto. Ebbe Vilborg. Malmö 1992. Bindita 478 p. (Vd. cetere E-nytt 1/92, p.2.)

Unumane, romano de Johan Hamond Rosbach, 1991. 125 p. 80 kr.

Silka kuseno, novelaro de Johan Hamond Rosbach, 1991, 64 p. 55 kr.

Edwin de Kock: *Vojaĝoj kaj aliaj poemoj*. 1992, 147 p.

Vibraĵoj, studlibro de Johan H. Rosbach. 1981. 83 p. 36 kr.

Penetre tra jarcentoj. Anekdotaro. 70 p. 25 kr.

Claude Piron: *La bona lingvo*. 1989. 112 p.

La kvar evangelioj, en nova traduko de Gerrit Berveling, kun enkonduko kaj notoj: po 47 kr.

William Auld: *Fenomenet esperanto*. 1987. 110 p. 50 kr. inkl. afrankon.

Nova UEA-katalogo

APERIS FINFINE la nova librokatalogo de UEA. Ĝi estas ĉi-foje en formato A5, kun 160 paĝoj. Kaj ĝi listigas ne nur librojn, ĉar inter la 34 ĉapitroj ni trovas ĉi-foje, krom "Lernolibroj", "Terminaroj", "Politiko" kaj "Religio", ankaŭ "Diskoj", "Kasedoj", "Vidbendoj", "Filatelaĵoj" kaj "Diversaĵoj". Utilega por klubaj libroservoj - kaj impona montraĵo por informbudo.

La Eldonejo vendas la katalogon por 25 kr.